
PENSEO

N-ro 350
dec. / 2020

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Tiberio Madonna (Italio)



La krueleco de l' naturo

La petaloj de la rozoj
falos diseriĝantaj
sur la herbon sekigitan
de l' suno.
En angulo de la herbejo
la formikoj en vico
forportas papilion
pecon post peco.
Ĉe la bazo de l' platano
nuda de aŭtuno
la delikataj membroj
de l' eta pasero
rabataj de muŝoj
kaj hororaj vermoj.
La verdo brilanta
de folioj freŝaj kaj glataj
ŝrumpas rigidiĝanta
en raspan brunon
kiu pikas la brunon
de l' tero frosta.
La uraganoj senkompataj
furiozantaj sur la mondo
similas al tiuj
kiuj agitiĝas
en l' animoj malviglaj
de la koroj sangantaj.
Kaj la sango
fluas torente
inter ŝtonoj kaj fragmentoj
de la amoj rompitaj.
Varmo kaj sekeco
kuniĝas por soifigi
tiujn samajn vivojn
kiujn pluvo kaj neĝo
kuniĝos por frostigi.
La kotaj padoj
enbrakigas la piedojn nudajn
de l' viktimoj
de cunamoj kaj tertremoj
dum la fulmoj
lumaj kaj blindaj
bruligas l' arbojn
kaj la gajecon.
La kuroj anheligaj
kaj terurplenaj
de la mildaj gazeloj
ĉasataj de la leonoj
finiĝos
eble neniam.
Kaj la kuro senpaŭza
de l' universo
finigos ĝin glutita
de l' terura nigra truo.

Starante
ĉe l' fenestro de la vivo
mi observas senespere
la kruelecon de l' naturo
presitan
per lafo de vulkano
sur la flugiloj de l' revoj.

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Vidpunkto

Kiel fiŝoj somnambulaj,
dubantaj pri l' oceano,
ni kuŝas mergitaj

en la materi’ trompiĝo
senmaskigita longe
de l’kvantumteorio.

Spiritaj estuloj,
el densigita lumo,
ni ĝuas la nudan dormon
de la sensoplezuroj.

La universo tiel grandas,
kiel nia egoismo fia
el fiera vanteco ...

Sed jen ni teruritaj
de la ombro de l’ morto,
denove forgesintaj,
ke la Vivo ne mortas;
ĝi nur renoviĝas!

Iam ni elkarniĝos,
sed ni neniam mortos!

Juiz de Fora, 01/05/2019.

Rita Mkrtĉjan (Armenio)



Mi ne povas kompreni la homojn,
Pri la kulpo diskutas, decidas,
Nur informaj ciferoj por iuj
Eĉ la agojn kruelajn pravigas.
Mi ne povas kompreni la vivon,
Ne kutimas kaj paco, kaj amo,
La sufero plenigis la marojn
“Ŝtormas” homa malam’ kiel flamo.
Mi ne povas kompreni la koron
Ĝi doloras, tagiĝo malhela,
Ĉies viv' kiel gutoj de sango
Ploras tero kaj griza ĉielo.

P.S. Ne gravas pasinteco, la historio ĉiujn juĝos, gravas la popolo, kiu ne impetis al milito, al senkulpaj mortoj, kiu dum tuta sia ekzisto celis vivi en paco, kun paco!

*** ***

Brakumu min, la aŭtuno,
Ni ofte iĝas tre malfortaj,
Vi kantu vian tristan kanton
Kaj diru poezian vorton.
Vi ploru per la pluv’ abunda
Vi kriu per la brua vento,
Anim’ vundita vin alvokas
Vi kvietigu miajn sentojn.
Sur vangoj— via frosta spiro,
Aromo de sopiraj floroj,
Brakumu min, la aŭtuno,
Ne lasu en soleco koron.
Kiel amiko el juneco
Vi fremda estas kaj la sama
Vi helpu min, la aŭtuno
Espero lasta, lasta amo.

*** ***

De iu tempo mi kolektas pensojn
Diverskoloraj, kiel la naturo,
Kiel ĉiel’ somera sunaj, helaj
Kaj tristaj, grizaj kiel la nebulo.
La pensoj pri doloro propra aŭ fremda,
Pri maljusteco, kiu ofte venkas,
Pri bonaj homoj, kiuj ne malmultas
Kaj pri espero, kiu ĉiam restas.
Mi lokas, fermas pensojn en la keston,
Sed ili buntas kaj protestas,
La nova tago mateniĝas
Kaj... novajn pensojn mi kolektas.

Wally Du Temple (Kanado)



Forglitos Urboj, Pri la urba fiziko de glaciglitoj

Pro degelo forglitos Londono ŝajne
Manhatan, Mumbaj, Pacifikaj insuloj ajne
Ili forglitos maren post diskreviĝo de
polusglaĉeroj
Kiam montsupraj glaĉeroj iĝas glaciriveroj
Pro aŭtoj, aviadiloj, industrioj, polucioj, avidaj
homoj, kaj egooj
Forglitos glacio kaj loĝkvartaloj de Islando.
Degelos, kaj forglitos la glaciejoj de
Groenlando

Ĝis akvo inundas nazotruojn niajn,
Kiam digoj, kaj domfostoj ne pli utilos.
Teruloj sen tero naĝos kiel fiŝoj
Inter la rubaj flosaĵoj de dronantaj metropoloj.
Forglitos Ateno, Rangun, Vankuvero
Ĉielskrapuloj pinte restos kiel hompostsignoj
Sen vivaj kaj kadukaj kiel la detruita regno de
'Ozymandias'
Ĝis nenio plia restas kaj ĉirkaŭe
Nur la blua maro etendiĝas ĝis la horizonto.
Sube restos fabelaj rakontoj de iamo
Kiel imagoj pri Atlantido subakviĝinta
Literaturo, arkitekturo, belarto, ĉu vere estis?
Ĉu io leviĝos denove kiel feto el la fekunda
utero de la maro?

Forta ekvento klinigas velboaton mian

Tial mi mankaptas la lofan flankon.
Sub la vela bumo amordezirantaj gevelantoj
Sin tenas tenere amkarese.
Dume ŝaŭma blankakvo inundas la ŝipkorpon.
La svingkilo vibresone murmurigas la
ŝipdekon.
Videble la amdeziraj korpoj de miaj
samŝipanoj tremblas
Sinalkroĉantaj unu la alian je fervoro
ekstazega.
Meze de tempesto miaj okuloj kaj buŝo gapas!
Ek la stirilo forte rezistas kontroladon.
Ne estas tempo ferli, katastrofo ekvenos.
Sub vela bumo viro levas sian korpon sur
virinon
Korpoj artropode etendiĝas arde seksdezire
Kaj nun la irisa orkoloro ŝanceliĝas
Paro da libeloj blu-arĝent-oraj
Ŝvebantaj je flugiloj diafanaj
Kopulacias amtutplene surbume!
Ho ve! Boato renversiĝas.
Mi naĝas.
La paro
Supren ĵetitaj
Je ok flugiloj

Finfike sorantaj!



Siv Burell (Svedio)



Unu du tri–A B C

Kara infano, vi havas
mondon kiu tute ampleksas
NUN, ne TIAM, kaj vi savas
la momenton, kiu perpleksas
nin – la "saĝaj plenkreskuloj".

Konstrui, malkonstrui
ridi aŭ plori
Ni la kapojn povas skui
enigmon esplori:
Kiel vi havas tiom da energi'
Tion fakte ne havas ni.

Forsuĉi la polvon
jen granda plezur' !
sed ĉu vi havas la solvon
de malinteres' ,
kiam vi havos dekses ?

Mi protestas

Mi protestas kontraŭ ĉio:
la eterna pluvado
la sanstato de kamarado
la dura vento
mia malbona sento
ke folioj abundas sur nia korto
ke mankas al mi forto

Se ĉiam estus ja sunlum'
kaj rido kaj ankaŭ ŝercum'
ĉu ni tute do komprenis

la feliĉon, kiu venis?

Eble donas suferad'
humilecon pri traktad'
de kunvivantoj kaj medi'
revenu la feliĉ' al vi !

Lasu la protestojn
aranĝu ĝojajn festojn!

Ankoraŭ iomete!

Pluku ankoraŭ kelkajn frambojn,
forprenu la fiherbojn
provi la falĉilon, eble mi volas,
pluki laktukojn, maldensigi anetojn.
Baldaŭ mi estos preta
Atendu!
Atendu!
La kamparo estas dolĉega.
La urbo ĉiam restas.
Atendu!
Atendu!
Mi volas ĝui kvieton
kaj forgesi la tempon!

Heine (1797-1856)

Sfinkso



Jen praas la fabelarbar'.
Odoras tilie flore.
La tre mirinda lunbizar'
ensorĉas min enkore.

Dum iris mi, la promenant',
eksonis en la alto
trilanta najtingala kant'
pri am' kaj amekzalto.

Pri am' ĝi kantis kaj dolor',
pri larmoj kaj pri ridoj,
jubile malgaje, singulte el kor'.
Relevis sin revaj idoj.

Mi iris plu kaj jen en hel'
montriĝis dum la halto
en senarbej' do la kastel',
frontonoj en granda alto.

Riglitaj fenestroj ĉie ĉi,
funebro kaj kvieto.
Laŭŝajne loĝis Mort' en ĝi
en trista murdiskreto.

Jen ĉe l' pordego kuŝis Sfinks',
ĥimero de tim' kaj amflamoj,
laŭ korp' kaj piedoj leon',
laŭ in' la kap' kaj mamoj.

Belega in', la blanka vid'
aludis vilan avidon.
La mutaj lipoj tordis sin,
ridetis jese senbridon.

La najtingal' belkantis tre,
ne povis mi plu disti,
kaj kiam mi kisis vizaĝen ŝin,
ne povis mi plu rezisti.

Fariĝis vivanta la marmoraĵ',
la ŝton' komencis ĝemi.
Ŝi suĉis la kisojn de mia ard',
volupte ekis tremi.

Ŝi ne plu lasis spiri min,
je l' fin' voluptavide
kroĉiĝis ŝi miakorpe sin,
leone ungege senbride.

Tre dolĉa torturo, beatiga ve'!
Doloro kaj ĝu' senmezure!

Kaj dum ŝia buŝ' min kisis kun ĝoj',
min vundis ungegoj terure.

La najtingalkant': „Ho, bela Sfinks'!
Ho, kara, pro kio l' intrigo,
ke miksas sin kun mortotorment'
ĉe vi la beatigo?

Ho, bela Sfinks'! Ho, solvu do
la kaŭzon de tiaj faroj!
Cerbumis longe mi pri ĝi,
ja eĉ dum mil da jaroj.“

el Novaj poemoj / Nova printempo

Tradukis



Hans-Georg Kaiser

(Germanio)

Mimoza Ahmeti



Sur la lito de la senfino

Sur la lito de la senfino mi kuŝas
Kie la kialoj malaperis kiel realaj estaĵoj,
Eĉ ankaŭ la homoj...

Mi mortos sur ĉi tiu lito, feliĉa,
Ke mi sukcesis ja kuŝi
Post la sklaveca laciĝo.

Mi estas hardita ŝnuro
Belece.
Sed, ĉio estas envana:
La floroj, la birdoj, la subtila herbo-
Ne gravaj signoj tiuj
Por respondi al nia ĝojo
Kiu estas
Ete malgranda.

Savita el materio kaj formo,
Sur la lito de la senfino mi kuŝas.
Montrita en la animo,
(La peko apenaŭ kaptas la animon, ĉu vi rimarkas)

Kial mi ne estas? Kial mi ne venas?
Ĉu vin ne okazis io pro mi
Ĉu ĝuste nun?
Kaj kion mi ekspektas sur ĉi tiu lito, kuŝante ekde tiom longe?
Nenion, krom mia pereo.
Pereo.

Lumo de la blanka papero

Ho, lumo de la blanka papero,
Skribas sur vi la homo de la mallumo.
El la sterila virgeco eliĝinta
Kiu pli nigra ol la nokto estas.
Nude la homo,
La raspitan veston de la virtuo
Forĵetis.

Ne malestimu, blankeco de la papero, ne elsputu per lumo
La obskuron de lia spirito, brilanta kiel smeraldo
Ne haltigu ke ĝi malpurigu per la ties likva animo
Kiu sangodoras,
Al ĉi tiu gracilo, kiu viro fariĝis.

Kun freŝaj muskoloj de la malriĉeco.
Ĉi tiun masklan ĝermon, kiu ankoraŭ burĝone tremas
Ĉar la tero estas elĉerpita...

Detruita subkonscio...
Ĉi tiu knabo, ĉi tiu viro
Kiu vin hontigas,
Kiun la peko per floroj piedmane liginta estas,
Por pretigi lin por la transa mondo...

Li estas ankaŭ tiun mondon vidinta,
Ĉiujn mondojn li estas vidinta.
La homojn estintajn kaj foririntajn,
Tiujn vivantajn kaj por foriri naskiĝantajn.

Ah-ojn de la vivo, stinkojn de la morto,
La florantajn junulujn, krucigitajn...

Ĉi tiu knabo, ĉi tiu viro, ĉi tiu malpura
virgeco,
Kiel Dio travivis.

Nun ridetas, dum piedpremis
La raspitan, virtuan veston.
Nude, je ĉirkaŭpreno de la morto ĉirkaŭ la
kolo
Estas natura.
Tiom. Kaj ne plu.

Ĉio finiĝas por komenci denove ĉi tie.
Ĉio mortas por leviĝi en ĉi tiu punkto.
La vivo lumigas en la brilo de la falo.

Ho, lumo de la blanka papero,
Skribis sur vi la homo de ĉiuj mallumoj.
Elalbanigis



Bardhyl Senimi (Albanio)

El Ĉina Antikva Poezio

Su Zhe (1039-1112)

Aŭtunmeza festo en Xuzhou

—laŭ melodio *Preludo de akva melodio*

Tre longe mi ne vidas vin,
sep aŭtunmezaj festoj jam forpasis.
Lastjare hodiaŭe en lun-ilumin'
mi sola sidis jen kun ĉagrenpleno.
Mi ne atendas, ke hodiaŭ sen deprim'
ni flosas ŝipe sur rivero sub la monto,
kantante kaj distrante nin
per flutoj kaj tamburo.
Sovaĝanseroj panikiĝas,
forflugas tuj al malproksim'.

La gastoj en la ŝipo estas
vestitaj lukse, bele.
Sed lun' rifuzis resti plue
kun ni kaj jam falsinkis ŝtele.
Hodiaŭ nokte ni orgias ĝoje,
dum morgaŭ mi solece surrivere
surŝipe loĝos, akompane
de spleno kaj ĉagren' mizere.
Vole ne vole mi nur versas
sur alta turo malespere.

Li Zhiyi (1038-1117)

—laŭ melodio *Aŭguristo*

Mi loĝas jen ĉe unu fino de l' river',
kaj vi ĉe la alia, ho, amato mia.
tagnokte mi sopiras al vi kun sincer',
sed ni ne povas vidi unu al l' alia
eĉ se ni trinkas el la sama akvo-sfer'.

Kiam la rivero ĉesus flui for?
Kiam mia sopirem' finiĝos jam?
Mi deziras, ke vi havas min en kor',
kiel mi vin korinklinu per la am',
kaj ne min vanigu ja en ĉiu hor'.

Zhang Shunmin (?-?)

Surskribo pri Yueyang-turo

—laŭ melodio *Florvendistino*

Folioj falas sur la monto,
lagakvo kunfandiĝas kun ĉielo
ĉe la nebula horizonto.
La kantistin' plenigas tason
per vino, kun kaŝita rido-ondo.
Ĉifoje mi ne iros okcidenten
por devplenumi ĉe la fronto.
Ne kantu, ho knabino, la kanzonon
pri adiaŭo por venonta re-renkonto.

Apogante min sur balustrado
de alta turo, mi rigardas en ebrio.
Ĉielo palas, kaj trankvilas nuboj,
jen tio pelas min al la racio.
Ĉu iu povus ja reveni laŭ la vojo

de l' ekzilitoj jen en agonio?
Turnante mian kapon mi direktas
rigardon al la fajroruĝa horizonto,
kie forlasis mi l' ĉefurbon de la
imperio.

Shu Dan (1041-1104)

Al amiko

—laŭ melodio *Belulino Yu*

Lotusfloroj falas tute,
verda akv' spegulas la ĉielon.
Ĉe vespero vent' krispigas
akvsurfacon, levas ondmantelon.
Paroj da hirundoj flugas
jen en nuban gelon.
Sola mi ascendas turon etan
kaj rigardas foran belon.

La banala vivo ĉiam
alkroĉiĝas al la tas' de vin'.
Neĝo jam plenkovras vojojn
al ĉefurb' ĝis blanka fin'.
Certas mi, ke la amikoj en la foro
ja suriros altan turon, min
fiksrigardos kaj donacos al mi
branĉon kun prunfloroj ja el
malproksim'.

Huang Chang (1044-1130)

Konkurso de drakboatoj

—laŭ melodio *Mallongigita melodio magnolia*

Kun ruĝaj flagoj alt-levitaj
la drakboatoj startas per akv-tondo
el sabla benko plena je salikoj.
Tamburoj bruas kiel tondro
printempa el ĉielo hela.
Vetkuras ili sur la ondo
direkte al la fumnebula fronto.

Ĝojkrioj, ovacioj de spektantoj
la teron skuas vere.
La drakboata antaŭanto montras
batalspiriton preman ja konkere.
Ĉe l' okcident' de luksa domo
la drakboato-ĉampion' fiere
revenas ja triumfe senŝancele.

elĉinigis



Vejdo (Ĉinio)

Qiu Wei (? - ?)

Ne trovi la ermiton en l' Okcidenta Monto

De sube l' voj' ascendas tridek liojn,
sur monta supro ĥato sin prezentas.
Ne estas servoknabo ĉe la pordo,
skrib- kaj te-tabloj ene nur silentas.
La mastro aŭ eliras per la ĉaro,
aŭ ĉe aŭtuna akvo fiŝojn hokas.
Mi perdis la okazon lin viziti
kun kulto, kiun mi en koro lokas.
En nova pluv' la verdaj herboj freŝas,
vespere l' pinoj ĉe l' fenestr'
murmuras.
En tia kvietejo, kie decas
purigi la animon, mi plezuras.
Malhavas mi honoron vin renkonti,
la zeno tamen iluminis min.
Ĝuinte jam, de l' monto mi descendas.
Kial mi devus nepre vidi vin?

Li Qi (? - ?)

Gardado ĉe landlimo

Tage sur mont' gardistoj rigardas signalfajron,
vespere la ĉevalojn trinkigas ĉe l' rivero.
En sabloŝtormo klakas frapilo en mallumo,
kiel la ĝema tono de bivo en tenebro.

Vastega nebulnubo vualas urbajn murojn,
pluvo kaj neĝo kovras dezerton en tumulto.
Sovaĝanseroj nokte traflugas vekriante,
ĉiu el la tataroj lamentas kun larm-multo.

Blokiĝas vojo, kiu direktas sin al hejmo,
soldatoj generalon nur sekvas en penego.
Kadavroj ĉiujare dismetas sin sur kampo,
sed kio alvenigas tributon nur por regno.

Versoj laŭ antikva stilo

De juneco viro migras norde,
havas la aspiron pri batalo.
Li ne ŝparas la staturon altan
por landlimon gardi sur ĉevalo.
Pro impona barbo lia, kun li
ne aŭdacas lukti la rivalo.

Sur montaro flava peze flosas blankaj nuboj,
rehejmiĝ' ne eblas por soldatoj sen merito.
Estas virineto dekkvin-jara el hejmlando,
kiu lertas je bivlud' kaj danc' en eskvizito.
Nun ŝi ludas flut-arion "Elir' el Pasejo",
ke ploregas tri armeoj fronte al milito.

Elĉinigis



Minosun (Ĉinio)



Zhuangzi

ĈAPITRO DUDEK-TRIA

Gengsang Chu

§23-03

La homo, en kiu regas granda paco, disradias ĉielan lumon. Li eligas ĉielan lumon, kaj en li ĉiu homo vidas homon kaj ĉiu estaĵo vidas estaĵon. Tiu, kiu sin kulturas, havas konstantan naturon; tiu, kiu havas konstantan naturon, ĝuas ĉies serĉatecon kaj estas helpata de la ĉielo. Tiu, kiu ĝuas ĉies serĉatecon, estas nomata homo de la naturo; tiu, kiu estas helpata de la ĉielo, estas nomata filo de la naturo.

§23-04

Ĉu tiu, kiu penas lerni, celas lerni kion li ne povas lerni? Ĉu tiu, kiu penas plenumi, celas plenumi kion li ne povas plenumi? Ĉu tiu, kiu penas argumenti, celas argumenti pri tio, kion li ne povas priargumenti?

Sekve, tiu, kiu scias halti ĉe tio, kion li ne povas kompreni, atingas perfektecon; tiu, kiu ne scias halti ĉe tio, kion li ne povas kompreni, difektas sian denaskan naturon.

§23-05

Konservu vian sanon helpe de ĉiuj estaĵoj de la mondo; nutru vian spiriton per retenitaj pensoj; kulturu vian menson interne por lukti kun la eksteraj estaĵoj. Se vi jam atingis tiujn ĉi tri kaj tamen ankoraŭ estas turmentata de diversaj malfeliĉoj, tio ŝuldas al la funkciado de la ĉielo, ne de la homo mem. Tio ne influos vian virton, nek perturbos vian menson. Vi devas lerni regi vian menson, ke vi regu ĝin nekonscie anstataŭ konscie.

Se vi elmontras tion, kion vi mem ne povas regi en vi, vi elmontras vian menson ne en ĝusta maniero. Se vi obstine tenas eksterajn estaĵojn en via menso, vi perdas vian denaskan naturon. Tiu, kiu malkaŝe faras malbonon, estas kondamnita de la popolo; tiu, kiu kaŝe faras malbonon, estas kondamnita de sia konscienco. Tiu, kiu povas vizaĝi al la homoj kaj al sia propra konscienco kun trankvila menso, povas iradi sola sen timo.

Tiu, kiu agas laŭ sia interno, ne zorgas pri la famo, nek pri la postesignoj de siaj agoj; tiu, kiu agas laŭ la ekstero, celas la famon kaj la riĉaĵon. Tiu, kiu ne zorgas pri la famo, nek pri la postesignoj de siaj agoj, estas mense simpla sed havas aŭreolon ĉirkaŭ si; tiu, kiu celas la famon kaj la riĉaĵon, estas nur komercisto — lia maltrankvilo estas evidenta kvankam li alte pensas pri si mem.

Tiu, kiu ĉiam konformigas sin al la eksteraj estaĵoj, vivas en harmonio kun ili; tiu, kiu ne konformigas sin al la eksteraj estaĵoj,

ne toleras eĉ sin mem, por ne paroli pri tolero al aliaj. Tiu, kiu ne toleras aliajn, havas neniajn amikojn ĉirkaŭ si; tiu, kiu havas neniajn amikojn ĉirkaŭ si, estas forĵetita de la socio.

Nenia armilo estas pli akra ol la volo. Eĉ la plej akra glavo estas malsupera al la volo. Nenia vundo estas pli grava, ol tio, kio estas farita de la jino kaj la jango; ili estas ĉie en la mondo. La jino kaj la jango mem ne vundas homojn. Estas la homa volo, kiu ilin pelas.

§23-06

La Taŭo trapenetras ĉion kaj ĉien. Divido kondukas al kompletiĝo, kaj kompletiĝo kondukas al detruo. Oni malŝatas dividon, ĉar oni, vidante partojn, volas kompletecon; oni malŝatas ankaŭ kompletiĝon, ĉar oni, posedante kompletecon, volas ankoraŭ pli perfektan kompletecon. Tiu, kies spirito forlasas lian fizikan formon kaj ne revenas, estas fantomo; tiu, kies spirito forlasas lian fizikan formon kaj trovas alian loĝejon, estas mortinta. Tiu, kies denaska naturo estas pereinta sed kies fizika formo ankoraŭ ekzistas, estas ne pli ol fantomo. Li estas en trankvileco nur tiam, kiam li sekvas la senforman Taŭon per sia fizika formo.

La Taŭo venas de nenie kaj iras al nenie. Ĝi estas substanca, sed ĝi restas en neniu difinita loko. Ĝi ekzistas de ĉiam, havante nenian komencon, nek finon. La estaĵoj venas el tio, kio havas neniajn aperturojn, sed estas substanca. Tio, kio estas substanca kaj tamen restas en nenia difinita loko, estas la spaco. Tio, kio ekzistas de ĉiam, havante nenian komencon, nek finon, estas la tempo. Estas naskiĝo kaj estas morto; estas eliro kaj estas eniro. La loko, el kiu la estaĵoj eliras kaj eniras, havas nenian fizikan formon. Tio estas nomata la ĉiela pordo, kiu estas la neekzisto. Ĉiuj estaĵoj en la mondo eliras el la neekzisto. La ekzisto ne povas eliri el la ekzisto. Ĝi povas eliri nur el la neekzisto, t.e. la absoluta nenieco. Jen kie la saĝuloj loĝas.

§23-07

La antikvuloj atingis la plej altan sciadon en iuj rilatoj. En kiuj rilatoj do ili atingis la plej altan sciadon? Troviĝas iuj, kiuj opiniis, ke ekzistis ankoraŭ nenio ekde la komenco — tio ĉi estas la ekstrema vidpunkto, la absoluta vidpunkto. Troviĝis aliaj, kiuj opiniis, ke ekzistis estaĵoj ekde la komenco. Ili rigardis la naskiĝon kiel perdon kaj la morton kiel revenon. Sekve la estaĵoj jam havis distingojn inter si. Troviĝis ankoraŭ aliaj, kiuj opiniis, ke la komenco de la mondo estis la neekzisto aŭ la nenieco, el kiu estiĝis la vivo, kiu baldaŭ turniĝis en morton. Ili rigardis la neekziston kiel la kapon, la vivon kiel la trunkon, kaj la morton kiel la kokcigon. Mi amikiĝos kun tiuj, kiuj scias, ke la neekzisto, la vivo kaj la morto havas saman originon. Tiuj ĉi tri estas diferencaj inter si, sed ili ĉiuj apartenas al la sama familio — la Taŭo. Tio estas same kiel la Zhao-anoj kaj la Jing-anoj, kiuj estis fame konataj per siaj rangoj, kaj la Jia-anoj, kiuj estis fame konataj per sia teritorio. Ili ĉiuj apartenis al la sama klano en la regno Chu, kvankam ili portis malsamajn familiajn nomojn.

Elĉinigis




Wang Chongfang

(Ĉinio)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbio)



Post pluvo aperis ĉielarko

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Malfrua
aŭtuno freŝas.
Post sufoka somero

profunda spiro plaĉas.
Tial ni ĝojas.

Tenere
svingiĝas branĉet'.
Kveras blanka kolombet'.
Gajas birdoj en kvartet'.
Bruas ĉi parket'.

Susure
falas foliar'.
Vento ŝtelas iuj,
por ke dancu en la par'
super ĉi montar'.

Rapide
fluis riveret'.
Mire ĝi aspektas, eĉ
bluas. Spegulas nubet'.
Surfaca perfekt'.

Salikej'
riverborde. Nek
unu libelo flirtas.
Salikbranĉoj ploras tre.
Ne plu sunum' . Ve!

Pensa transformiĝo

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Espero
laciĝis. Sento
de hezitem' altiĝis.
Fi ondojn forblovu vent'
kun la granda pent'.

Homaro
panikas tre.Ve
iuj ridis. Aliaj
gratulas sin mem. Nepre
ekkredu !Vere!

La dua
aŭ tria ondo!
Vintro estas sur la sojlo.
Miloj mortis en mondo!
Vivu hejmrondo!

Reveno
al familiaj
valoroj. Amo, kredo,
espero kaj similaj.
Ĉiuj tre noblaj!

Leviĝu
densa nebulo.
Resaniĝu popolo,
malaltiĝu fiuloj!
Vivu bonuloj!

Ekis vintraj nebuloj

—laŭ ĉinesko *Sopir-al-sudo**

Jen,vintra
nebulo rara.
Fumo el tuboj miksas
kun nebul' ĉi arbara.
Grizas kampara.

Nebulo
kiel kurteno
blanka, forglutas ĉion.
Antaŭ vi aĉa sceno:
Diabla beno!

Tamen Sun'
milde savas nin.
Varma leviĝanta Sun'
karesas radie nin,
forpelante ĝin!


Tiele
ĝi malaperas.
Jen, forvaporiĝis ĝi.
Dume ĉio ŝanĝiĝas.
Tero varmiĝas.

Novembra
mateno frostas.

Ofte vangoj ruĝiĝas.
Niajn manojn ĝi mordas.
Nazo gluiĝas!

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Ivaniĉka MAĜAROVA (Bulgario)



PERFIDO

Mi kaj Pejĉo sidas en noktatrinkejo. Ni sidas kaj rigardas unu la alian kun amemo. Ni pensas pri io bela, iam okazinta kaj neripetebla. Li etendas lian manon kaj ordigas petoleman tufon en mia hararo. Poste lia mano karesas tenere mian vizaĝon. Mi ekridetas al li enigme kaj kuraĝe. Fermante la okulojn volupte, mi etendas manon por tuŝeti la lian.

La drinkejo estas plenplena. Ĉiuj tabloj estas okupitaj krom unu. Sed ne longe al ĝi direktiĝas eleganta, juna viro. Li sidiĝas. Ho, terure! Li rimarkis min.

Mi plu rigardas ameme Pejĉon, tamen miaj kruroj tremas. Sed li tenas miajn manojn, kisas ilin tenere kaj flustras amajn vortojn. Malvarma ŝvito aperas sur mia frunto. Mi sentas, sur mia nuko, la frostigantan rigardon de la eleganta viro. La skandalo estas neevitebla. Kun la rapideco de la ruzolino mi ekstaras, por forlasi la noktamuzejon. Sed jam ests malfrue. La viro staras kaj alproksimiĝas al nia tablo. Li levis manon kaj per unu frapo surplankigas Pejĉon kiu falas. En la salono ekkuras onidiro de tablo al tablo ''Sia edzo kaptis ŝin kun la amato'' Kaj nenio supozas, ke mia amato estas la bela, eleganta, juna viro, kiu tiel kruele venĝis pro mia "perfido" kun Pejĉo, mia edzo.

Bulgario, Razgrad

Feng Jicai

Blankaj haroj

Kiam mi eniris en la aŭtunon de la homa vivo, amikoj fingromontris mian verton kaj demandis: "Ha, kial vi havas blankajn harojn?"

Aŭdinte tion, mi ridetante ne donis respondon. Okaze mi ŝerce respondis: "Ĉar la pigmento de la haroj jam tute enkuris sur paperojn de miaj manuskriptoj."

Tiamaniere en ĝojridado kaj menskonfuziteco mi transgrimpis la monteĝon de la homa vivo kaj komencis malsupreniri laŭ la deklivo, aŭ per pli da penoj strebis suprengrimpi iome.

Kiam mi rigardis miajn harojn en la spegulo, mi kelkfoje serioziĝis. Kiam aperis la unua blanka haro? Pro kio? Miaj pensoj plejofte transcendis tempon kaj spacon kaj reiris al tiufoja babilado kun la patrino dum mia knabeco. La patrino sidis kun la dorso al la malfermita fenestro. Zefiro sensone levetis la harojn de la patrino. Subite mi rimarkis, ke unu el ŝiaj haroj stariĝas blovate de la zefiro kaj arĝente brilas en vesperkrepuska sunlumo. Jen ĝi estas blanka haro! Tiu ĉi maldika blanka haro feble skuiĝis kaj rifuzis fali, kvazaŭ alvokante min. Estis la unua fojo por mi vidi la blankan haron de la patrino. Kaj mi forte sentis unuafoje, ke mia patrino ankaŭ maljuniĝas. Kiel terura afero ĝi estas! Mi nereteneble aliris kaj min ĵetis en ŝian sinon. Ne sciante, kio okazis, ŝi pridemandis min kaj penis levi min al la sida pozo, sed mi firme ĉirkaŭbrakumis ŝin, timante, ke ŝi forlasos... Post tio mi neniam diris al la patrino la kialon. La plej intensa sento malfacile esprimiĝis kaj la plej fragila sento devis trezore kaŝiĝi en la koro. Nuntempe la patrino jam havas blankajn harojn sur la tuta kapo, sed la unuafoja sento, kiam mi vidis ŝian blankan haron, estas profunda kaj neforgesebla. Tiamaj sento pri la vivo, tristeco kaj senhelpeco estas ĝuste tiel, kiel mi ne povus reĵeti la falintajn foliojn al la branĉoj...

Kiam mia edzino alportis antaŭ min taseton da har-koloriga likvo kaj flatkapan penikon, kaj petis al mi kolorigi ŝiajn harojn, mi sentis ekskuon en la koro. Ho, ĉu la viva arbaro de nia generacio komencas faligi foliojn? Ĵetinte ekrigardon al ŝiaj haroj, mi ridete diris: "Vi havas nur du aŭ tri blankajn harojn, kial vi faras monton el talpejo?" Sed kiam mi disŝovis ŝiajn harojn, mi surpriziĝis. En ŝiaj nigraj haroj kaŝiĝas eĉ tiom da blankaj haroj! Kiel malatentema mi estas, ke mi ne malkovras tion eĉ ĝis nun! Ĝuste pro abundo de blankaj haroj ŝi sin devigis uzi kolorigilon por kovri la malprosperiĝon de juneco. Tamen, kiel ŝiaj haroj

blankiĝis unu post alia el ŝiaj delikate bonodoraj kaj ebonnigraj haroj sur la tuta kapo? Ĉu pro miaj senĉesa okupiteco kaj flua parolado aŭ dum mia tag-nokta verkado absorbita? Ĉu tion kaŭzis la suferplena vivo de loĝado en alies domo post la tertremego? Ĉu ili subite blankiĝis de ŝia interna maltrankvileco pro mia grava malsano? Aŭ ĉu tiu afero... preskaŭ ŝin morte korŝiris kaj abrupte produktis tiom da blankaj haroj dumnokte?

Nigraj haroj similas verdajn herbojn kaj la blankaj la velkintajn herbojn. Kiel la verdaj herboj nigraj haroj elspiras la allogan etoson de la viviĝo, dum la blankaj, kiel velkintaj herboj, trembrilas per la okulpika, trista kaj elĉerpiĝinta koloro. Kiel mi povus redoni al ŝi la belajn nigrajn harojn kiel tiujn de tiu jaro?

Mi tre volis nigrigi ŝiajn blankiĝintajn harojn, ŝi tamen demandis: "Vi jam gutigis la likvon sur mian kaphaŭton, ĉu ne?"

Mi ekstuporis. Hasteme mi detenis miajn larmojn per la palpebroj por ne faligi ilin.

Unufoje mi donis al ŝi la reston de la har-koloriga likvo kaj petis al ŝi kolorigi la miajn. Post kolorigo mi eĉ aspektis multe juna ol antaŭe. Kiu dirus, ke la tempo malfacile ne revenus? Kiu dirus, ke la juneco ne plu restus konstante? Pro tio ankaŭ mi aliĝis al la vicaro, kiu volus retiri la tempon per utiligado de har-koloriga likvo. Oni neniel imagas, ke la har-kolorigo estas pli kaj pli malfacila afero, ĉar ĉiutaga pliigo de la blankaj haroj bezonas prilaboradon kaj la fakto sciiĝas, ke la blankaj haroj ne fariĝas el la nigraj, sed ekkreskas el la profundo de la kadukiĝinta vivo. La kolorigitaj haroj aspektas ebonnigraj, sed ĉe iliaj radikoj tuj aperas pure blanka koloro. Kiel ajn vi ilin kolorigas kaj kovras, ili elŝoviĝas unuj post aliaj. La aŭtuno de la homa vivo estas same obstinema kiel la printempo de la naturo. Nekovreblaj blankaj haroj!

Komence oni povas zorgeme kolorigi ilin, ne preterlasante eĉ unu haron, sed kiam oni estas okupita, oni ne trovas tempon por tio, lasante ilin kreski laŭplaĉe. Se kolorigi, tio ĝenas, dum se ne kolorigi, tio malbeligas. Iom post iom tio fariĝas ŝarĝo.

Tiutage najbara maljunulo faris viziton al mi. Spertoplena kaj erudicia, li aspektis sana kaj vigla, kun blanka hararo kaj sane ruĝa vizaĝo. Enirinte, li sidiĝis en la sunlumo. La bildo mirigis min: ne nur liaj kapharoj estas tute blankaj, sed ankaŭ liaj barbo kaj brovoj, kaj sub la forta sunlumo ili, tiel pufaj kiel mildaj, tiel rebrilaj tiel travideblaj, brilaj kiel arĝentaj silkostrioj, aspektas vere belaj, eĉ sen unu griznigra haro miksita en ili! Mi nereteneble diris: "Se mi havus belan kaj leĝeran blankan hararon kiel vi estonte! Nun estiĝas dilemo por mi kolorigi aŭ ne kolorigi."

Aŭdinte tion, li eksplodis per sonora ridado kaj poste diris al mi: "Mia juna frato, vi estas mensklara homo, kial vi fariĝas menskonfuza antaŭ la blankaj haroj? Infanoj havas la belecon de delikata naiveco, junuloj la belecon de vigleco, mezaĝuloj, kia vi, la belecon de matureco, kaj mi la belecon de maljunaj senĝeneco kaj aplombeco. Tio similas la kvar sezonojn de la naturo: la printempo verdas, la somero pompas, la aŭtuno buntas kaj la vintro puras. Ĉiu havas sian belecon kaj ĉiu havas sian avantaĝon. Neniu bezonas envii la aliajn nek imiti la aliajn. Imitado lacigas kaj sindevigo des pli lacigas. Temas pri homoj. Kiam vi vivas, lasu vin vigliĝi kiel eble plej dinamike; kiam vi estas mortonta, lasu vin kvietiĝi kiel eble plej statike. Agu laŭ la procezo de la naturo. Prave! Agi laŭ la procezo de la naturo signifas, ke ni ĝuu tian sezonon kia ĝi sin prezentas. He, mi ne scias, ĉu tiuj miaj vortoj utilas al vi aŭ ne, mia juna frato?"

Aŭdinte tion, mi tuj sentis, ke la tero pli larĝas kaj la ĉielo pli vastas, kaj min kaptis ĝojo en la koro. Mi ekskuis la kapon kaj la grizaj haroj sur la kapo svingiĝis, kvazaŭ vasto da aŭtunaj fragmitfloroj balanciĝus.

Elĉinigis **Fangfang (Ĉinio)**

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)

Retadreso: vejdo@163.com

www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_